

Unesko: Kiel savi la planedon?



**Germanio:
adiaŭo al nukleo**

**Niĝerio: dividoj venkitaj –
almenaŭ parte**

Edwin de Kock

Sub Fremdaj Ĉieloĵ

“Nekutime leginda verko”

Donald Broadribb



Ne nur poezio estas en la libro ... enestas, kompreneble, liaj “Lastaj poemoj” sed ne malmultaj scios ke post tiuj “lastaj” li jam verkis sufiĉe multe da postlastaj, kaj iuj el inter tiuj ankaŭ estas troveblaj en tiu ĉi honora kompilaĵo. Tre legindaj estas i.a. nepre la eseoj pri la historio de Esperanto en Sud-Afriko, pri la memorindaj personoj kiujn Edwin renkontis en kaj ekster la verda mondo.

Sed... prefere malkovru mem!

Paĝoj: 288; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008

Serio Stafeto n-ro: 32

Pezo: 333 g

ISBN: 978-90-77066-33-1

Prezo ĉe FEL: 22,50 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be



Dividoj venkitaj – almenaŭ parte 12

Fine de majo Niĝerio inaŭguris novajn prezidanton, federacian parlamenton kaj guberniestrojn en 26 el la 36 ŝtatoj, kie okazis balotoj.

Germanio: adiaŭo al nukleo 14

Post la tertremo kaj cunamo kun la detruoj en la japana nuklea centralo Fukuŝima okazis en Germanio manifestacioj postulantaj tujan malŝalton de ĉiuj atomcentraloj en Germanio. Ankaŭ en mia loĝurbo Aŭgsburgo estis tiel.

La organizantoj de la protestoj rezignis pri paroladoj de eminentuloj kaj politikistoj. Anstataŭe ili ebligis al partoprenantoj uzi mikrofonaĵojn kaj laŭparolilon por esprimi emociojn, timojn, postulojn kaj esperojn.

Kiel savi la planedon? 19



Dum politikistoj debatis en Cancún, Meksiko, kiel savi la planedon, en decembro de 2010 ĉe Unesko en Parizo kunvenis neregistaraj organizaĵoj (NROj) por diskuti, kiun rolon ludu la civila socio. Kiel kune difini, kio estas necesa? Kiel eduki infanojn kaj aliajn por daŭra kaj justa evoluo?

politiko

ALBANIO	8
Post 20 jaroj ...	
INTERNACIAJ RILATOJ	8
Modela kunlaboro	
IRLANDO	9
Mikspoto politika	
BALKANIO	9
Prezidantino elektita	
EBUR-BORDO	10
Dividita lando, komunaj esperoj	
ALBANIO	10
Prokrastita dankemo	
EŬROPA UNIO	11
„Eŭropo nin devigas!“	
AŬSTRIO	11
Ponta popolo	
NIĜERIO	12
Dividoj venkitaj – almenaŭ parte	

moderna vivo

FERVOJOJ	13
Laŭ linioj de la pasinteco	
GERMANIO	14
Adiaŭo al nukleo	
GULAGOJ	15
Kvarlingva „muzeo“	
BRITIO	16
Protesto gilotinista	
BICIKLADO	16
Tragedio homa kaj sporta	
JURO	17
Davido Valonio kontraŭ Goliato Google	
USONO	17
Barbara minoritato	

turismo

KOSOVO	18
La marmora groto Gadime	

eseo

UNESKO	19
Kiel savi la planedon?	

medio

AŬSTRIO: Energio de la tegmento	20
--	----

novelo

Renkontiĝo	21
------------------	----

libroj

Akutagawa: „patro de la japana novelo“	23
Ateismo eksterscience	24

enigmoj

Duobla laboro	26
---------------------	----

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakte al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be.
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Bosnio-Herc.	BAM	50	55	30	11	18
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	25	28	15	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	67
Estonio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Grekio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hispanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hungario	HUF	8100	8900	4860	1530	2500
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Latvio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Litovio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalia	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	25	28	15	5,5	9
Slovakio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Slovenio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	85
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, 4/23 Albuera Street, Battery Point Tas 7004, Australia. Reto: libroserv@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: aon.913548977@aon.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Bosnia kaj hercegovina:** Esperanto-Ligo, Kralja Tvrtka 19 (Pf. 452), 71000 Sarajevo. Konto: 338-900-220-635-2698. Reto: info@esperanto.ba.
- > **Brazilo:** Brazilo Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi.
- > **Francia:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
 - > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 - > **Hungara:** AbonaSoft Bt, HU-1093 Budapest, Bakáts u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
 - > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
 - > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
 - > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: fesp.it@infinito.it.
 - > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
 - > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
 - > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860. Reto: esperanto@saluton.net.
 - > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 606-1250,

- Escáz. Reto: miaumiau@ice.co.cr.
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr.
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: wickler.albert@gmx.net.
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City 0630. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljković 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.rs.
 - > **Slovaka:** Stano Marček, Zvolenská 15/11, SK-3601 Martin. Reto: marcek@esperanto.sk.
 - > **Slovenaj:**
 - > Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brancovic@os.htnet.hr.
 - > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr.
 - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
 - > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schledorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org.

Flatu nin!

Regule interesiĝantoj pri MONATO demandas nin, kiom da legantoj nia revuo havas. Malfacilas respondi tiun demandon. Ĉu „niaj legantoj“ estas tiuj kelkmiloj, kiuj abonas ĝin? Aŭ ĉu temas ankaŭ pri tiuj multaj dekmiloj, kiuj ĉiumonate legas unu-du artikolojn interrete? Aŭ pri tiuj, kiuj estas nepagipovaj kaj eĉ legas kompletajn malnovajn jarkolektojn en la retpaĝaro de MONATO? La demando do ne estas respondebla, sed estas klare, ke la nombro de nepagantaj legantoj larĝe superas tiun de la fidelaj abonantoj, kiuj estas la bazo de la ekzisto de la magazino.

Ĉu tiuj dekmiloj da neabonantoj entute ne volas aboni, aŭ ne povas aboni? Aŭ ĉu ili legas nur kelkajn artikolojn kaj opinias, ke pagi plenan kotizon por tio ne valoras? Nu, kiel



estu, por tiaj personoj ekzistas „servoj por sociaj mikropagoj“. Unu el tiuj estas la sveda *Flattr*. Kiel ĝi funkcias? Post via aliĝo en *flattr.com* vi deponas tie liberan sumon, ekzemple 2 eŭrojn. Kiam vi legas en la retejo de MONATO iun interesan artikolon, vi alklakas la tian *Flattr*-butonon kaj finite. Se en tuta monato vi alklakas nur tiun unu butonon, tiam via tuta bonhavo de 2 eŭroj estos sendita al MONATO. Tamen, se vi ankaŭ alklakas butonon apud artikolo de, ekzemple, Vikipedio, tiam via bonhavo de 2 eŭroj estos dividi-

ta inter MONATO kaj Vikipedio. Do vi neniam povos elspezi pli multe, ol vi antaŭe deponis. La sumo, kiun ni ricevas de unu persono, do eble nur estas eta, sed multaj tiaj etaj mikropagoj ja povas formi grandan enspezon.

Ankoraŭ ne ĉiu artikolo de MONATO havas *Flattr*-butonon. Depende de la sukceso de la agado ili estos aldonitaj iom post iom. Vi trovas nun butonon ekzemple ĉe la kompletaj jarkolektoj, kiel en www.esperanto.be/fell2010/index.php. Ĉu vi konas neabonantojn de MONATO? Sciigu al ili, kiel ili facile kaj malmultekoste povas subteni vian magazinon! Diru al ili, kiel facile ili povas flati nin!

Sincere via

Paŭl Peeraerts



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 32a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: info@fel.esperanto.be, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

sociaj retejoj:

- Twitter: @FEL_Antverpeno
- Facebook: <http://eo-eo.facebook.com/revuo.Monato>
- Ipernity: <http://flandra-esperanto-ligo.ipernity.com>

honora ĉefredaktoro:

Stefan Maul.

ĉefredaktoro:

Paul Gubbins, 3 Arden Court, Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Rob Moerbeek, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

teknika redaktoro:

Christina Schwarzenstein

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- Arto: Claude Nourmont-Moon, 2 Om

Klappchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vis-spaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzelangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

- **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono. Telefono 440-646-1482. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

- **Lingvo:** Andy Peetermans, Schallhoevestraat 23, B-2220 Heist-op-den-Berg

Rete: lingvo@monato.net.

- **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario. Rete: medio@monato.net.

- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

- **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: noveloj@monato.net.

- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

- **Scienco:** Rete: scienco@monato.net.

- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net.

- **Serco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherc_kaj_satiro@monato.net.

- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzelangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Belas malgrando

Mi grandparte samopinias kun Garvan Makaj (MONATO 2011/6, p. 8). Mi ne vere komprenas la deziron pri ŝtata unuiĝo, kiun multe da esperantistoj havas. Diverseco estas pli riĉa ol monokulturo, kaj tio validas ankaŭ por ŝtatoj, registaroj, politikaj sistemoj ktp. Unu granda mond-imperio certe estus terura, griza, konformista diktaturo, ĉiuokaze, eĉ se ĉiu „mondcivilitano” havus voĉdonrajton. En tiu mondo simple ne plu ekzistus iu ajn maniero starigi alternativojn aŭ eskapi de la centra povo de la burokrataro. Se la registaro farus malbonan decidon, estus vere monda katastrofo ne plu evitebla aŭ korektebla.

Fine mi povus aldoni hipotezon biologian: ĉu ni, homoj, vere kapablas kompreni la mondon kiel unu grandan sistemon? Ĉar tio estus la plej grava necesajo por havi grandan superŝtaton. Nia evolua historio estis historio de centmiloj da jaroj en etaj bandoj, kutime ne pli ol cent aŭ ducent maksimume, kaj la mondaj eventoj kaj katastrofoj homdevenaj de la pasintaj

jaroj certe ne donas bonan impreson de nia evoluo ...

Kevin de Laet
Belgio

Belas malgrando (2)

La demando estas, ĉu ni entute bezonus ŝtaton, se ne ekzistus aliaj ŝtatoj por minaci nian. La pragrekaj urboŝtatoj estis demokratiaj (escepte de virinoj kaj sklavoj!), sed ili konstante intermilitis. En la romia imperio dum jarcentoj regis paco – krom ĉe la limoj kun la barbaraj teritorioj. La malgrandaj nord-okcident-eŭropaj ŝtatoj estas prosperaj kaj kontentaj – ĉar iliajn militajn problemojn prizorgas NATO kaj Usono.

Diverseco estas bona afero, sed oni devas akcepti diversecon ankaŭ interne de la unuopa ŝtato. Kun tiu akcepto eblas doni propran ŝtaton al ĉiu nacio, krom eble la plej malgrandegaj. La nacio eĉ ne bezonas havi plimultan loĝantaron en sia ŝtata teritorio.

Jens S. Larsen
Danio

Belas malgrando (3)

Mia vidpunkto necese estas laŭ mia sperto kiel afrikano. Mia lando Niĝerio havas preskaŭ 300 etnajn grupojn kaj pli ol 120 milionojn da loĝantoj. Do se pro tio, ke vera demokratio neblas (jes, la ĥaoso kiu sekvas ĉiun voĉdonon en Niĝerio estas pruvo, ke demokratio ne povas vere enradikiĝi en la lando) la lando devas peciĝi en preskaŭ 300 grupoj, por ke demokratio vere ekzistu, tio ankoraŭ ne garantios pacon ... La unuiĝo de la norda kaj suda Niĝerio de la Britaj Majstroj estas ĝis nun, kaj eble eterne, konsiderata kiel granda eraro, ĉar krom haŭtkoloro nenio inter la du flankoj estas sama aŭ simila. Vera demokratio eblas en malgranda homogena grupo, ne en lando kun centoj da kulturoj. Do mi pensas, ke la sola problemo de la mondo estas ... tro da homoj. En pereanta mondo, kie oni multoblighas kiaj ratoj, la rakontoj de la estontaj generacioj estos ... Ne, mi timas imagi ilin. Tamen tiun ĉi problemon spertos ĉefe la malriĉaj landoj, sed la riĉaj memoru, ke ili bezonas grandajn kaj altajn murojn ĉe siaj bordoj por malhelpi hominundon!

Gabriel O. Ōshó-Davies
Niĝerio



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.



La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado.

Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la retaj versioj de MONATO.

Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Komplete konfuzita

Paul Gubbins

Mi estas unukompletulo. Tio estas, ke mi posedas unusolan kompletan, malhelkoloran, kiun mi elŝrankigas nupto-aŭ funebro-kiale. Kompletan mi ne bezonas en la laborejo (tamen, iom malnovstile, kaj malgraŭ la kutimo de pli junaj kolegoj, jako kaj kravato min ornamas en la universitato por mesaĝi al studentoj, ke mi ne estas ilia Facebook- aŭ Twitter-kompano, sed ja instruisto).

Krome kompletan mi ne bezonas por redakti MONATO-artikolojn (malgraŭ antaŭmilita tradicio de BBC-novaĵbultenistoj, kiuj legis radio-raportojn – radio, diable – portante smokingon).

Do mia kompleto, aĉetita antaŭ eonoj, malofte taglumon vidas. Ĝenerale, nuntempe, ĝi aerumiĝas pli ofte pro funebro ol pro nuptoj: kaj mi kaj la kompleto atingis aĝon, kiam pli da parencoj kaj konatoj elektas ĝisi – se vi kredas je transmondo – ol kisi.

Ekskursis

Kaj do tial ekskursis lastatempe la kompleto. Temis pri la funebraĵo de la patrino de lerneja amiko, do sinjorino, kiun mi jam de pli ol duonjarcento konis. Ŝi mortis, 87-jaraĝa, pro diversaj medicinaj problemetoj, ĉiuj kun longaj, apenaŭ prononceblaj nomoj, sed kiuj unuvorte resumiĝas: maljuneco.

Pro ŝia aĝo malmultis en la preĝejo funebrantoj. Ŝi estis di-kredanto; almenaŭ unu el ŝiaj filoj ne plu. Leviĝas demando: por kiu oni aranĝu religian funebran ceremonion? Por mortinto, kiu dezirus, sed ne ĉeestas (almenaŭ ne en reala senco), aŭ por postvivantoj, kiuj ne deziras, sed ja ĉeestas?

Tiel cerbumante, en mia malantaŭa loko en la preĝejo (por observi, kiam

ekstari, kiam eksidi), mi subite konsciis ion, kion mi jam delonge suspektas: kompletoj funebraĵe same eksmodiĝis kiel surrele vaporlokomotivoj.

Helgrizis

Iom konsternite (la kompleto eĉ pli konsterniĝis), mi konstatis, ke verdire mi estas tro formale vestita. Nur la du filoj de la mortinto portis – krom mi – kompletojn (kaj unu el tiuj ne nigran, sed helgrizan). Plejparte la funebrantoj portis ordinarajn, ĉiutagajn, diverskolorajn vestaĵojn, kvazaŭ ili irus al butikoj, kafejoj, amikoj (kion ili tre verŝajne estis farontaj poste).

Tio iom malĝojigis min. Kiam mi estis knabo, kaj mortis najbaro, miaj gepatroj fermis la kurtenojn; ni in-

fanoj ne rajtis ekstere ludi kaj brui. Surstrate, biciklante, kiam proksimiĝis funebra procesio, mi devis desalti de sur mia biciklo kaj stari sur la trotuaro, kun kapo klinita, ĝis preterpasis la ĉerko.

Al tempoj tiaj mi ne volas reveni. Vivo pli gravas ol morto: surtere vivantoj nepre havu prioritaton. Tamen morto estas morto, kaj decas iom da respekto, minimuma gesto – ekzemple vestaĵa – por adiaŭi kunhomon, por digne danki pro vivo kuraĝe, plene, foje suferi, vivita.

Komprenis

Niaj barokaj prapatroj, ankaŭ, mi kredas, niaj viktoriaj, funde komprenis, kio estas morto. Ni, aliflanke, almenaŭ en okcidento, arogante, egoisme, fidante pilolojn kaj aliajn kuracilojn, fermas niajn orelojn al la silento de la atendanta tombo. Kvazaŭ infanoj, ni volas ludi, brui, rifuzas tiri la kurtenojn, ne havas tempon stari vid-al-vide al la morto kun kapo klinita. Spiti la morton ni volas, celebri la vivon – kaj pro tio la ordinaraj, porvivaj, ne pormortaj, vestaĵoj. Aliaj mortu: ni ne.

Eble nuran britan fenomenon mi priskribas. Eble en aliaj landoj vi pli respektas la morton. Kaj, jes, eĉ en Britio ne ĉio estas tiurilate perdita. Survoje al la funebraĵo de la patrino de mia amiko, mi preterpasis preĝejon, antaŭ kiu staris funebrantoj, ĉiuj, junaj kaj maljunaj, digne kaj respektoplene nigre (kaj komplete) vestitaj. Sed tio, mi kredas, fariĝas escepto.

Ho, la kompatinda kompleto. Ĉu ekde nun ĝi vidos taglumon nur okaze de nuptofestoj? Kion mi do portu, kiam mi ĉeestos la venontan funebraĵon? Honeste, mi ne plu scias, ne plu certas. Jes, ja ... komplete konfuzita. ■



Vivo pli gravas ol morto: surtere vivantoj nepre havu prioritaton. Tamen morto estas morto, kaj decas iom da respekto...

Post 20 jaroj ...



La statuo de Enver Hoxha en Tirano

En februaro albanoj festis per kanzon-koncertoj en la ĉefurbo Tirano kaj en aliaj lokoj la 20-jariĝon de la faligo de statuo de Enver Hoxha [hodja], unu el la lastaj diktatoroj en la orienta Eŭropo.

Tiam, en 1991, miloj da gestudentoj de la ŝtata universitato „Enver Hoxha”

postulis, ke oni forigu la nomon de la diktatoro de ilia klerigejo. Ilin subtenis pli ol 100 000 ĉefurbanoj, aparte sindikatanoj.

Intervenis la polico, sed la protestantoj sukcesis faligi la statuon. Ĝin ili tiris per kamiono tra la stratoj ĝis la studenta domaro. Al albanoj same gravas la faligo de la statuo kiel al germanoj la faligo de la berlina muro. Ĝi lanĉis novan eraon en tiu ĉi ekskomunisma lando.

Teroro

Mezaĝaj albanoj nun malame memoras sian iaman diktatoron kiel kapon de mafieca klano, kiu dum duonjarcento ekspluatis kaj turmentis tutan popolon. Oni kalkulas, ke dum la teroro komunis-

ma estas persekutitaj, enprizonigitaj aŭ mortigitaj ĉ. 800 000 albanoj. Samopinas la juna generacio pro la rakontoj de siaj gepatroj.

Poste, pro sia pasinteco, Albanio suferis longan transiran periodon. Triono de la albana popolo elmigris; restis tamen la idoj de iamaj komunistaj potenculoj, membroj ĝenerale de maldekstraj partioj, kiuj provas rekapti la povon. Ili uzas monon akiritan dum la komunisma reĝimo.

Pro la relativa malriĉeco kaj post-restanteco de la albana ekonomio, daŭre rimarkeblas korupto en la publika vivo. Tial la popolo iomete seniluziiĝas. Malgrandas esperoj pri la estonteco.

Bardhyl Selimi

INTERNACIAJ RILATOJ

Modela kunlaboro

Pli da kunlaboro inter Albanio kaj Kosovo postulis la nova prezidento de Kosovo, Behgjet Pacolli [behĝet pacoli], dum sia unua vizito al najbara Albanio.

Parolante antaŭ albanaj deputitoj, Pacolli diris, ke la nova aŭtoŝoseo Kukës-Morine Durrës, kiu kunligas la marbordon de Adriatiko kun Kosovo, estas unua paŝo. Tamen, li diris, nepras antaŭenmarŝi per pli grandaj paŝoj ekonomiaj, kulturaj kaj spiritaĵoj. Varoj, kapitaloj, ideoj kaj homoj moviĝu libere inter la du landoj.

Elektro

Albanio kaj Kosovo tradicie subtenas unu la alian. Kosovo eksportas al Albanio cerealojn, viandaĵojn kaj elektron dum sekaj sezonoj; Albanio reciprokas per legomoj, fruktoj, salo, laktaĵoj, olivoj kaj elektro dum la vintra periodo.

Tiel eblus komuna elektroenergia sistemo, ankaŭ unuigitaj lernejoj programoj, lernolibroj, sciencaj kaj oficialaj terminoj por ĉiaspecaj dokumentoj. Komuneco povus tuŝi ankaŭ Makedonion kaj Montenegron, almenaŭ en ekonomiaj sferoj.



Behgjet Pacolli.

Tiamaniere, sekvante la modelon de Eŭropa Unio, ambaŭ landoj povus sin pretigi pli bone kaj pli efike por iam aliĝi al EU.

Bardhyl Selimi

IRLANDO

Mikspoto politika

Dum la historio de la moderna irlandia ŝtato la lando estis alterne regata de unu el du partioj ideologie nedistingeblaj. Nur la nomoj, kaj la fakto, ke ili devenas de la du kontraŭaj flankoj dum la irlandia enlanda milito de 1922-1923, ilin apartigas.

La rezultantaj politikaj partioj, nome FF kaj FG, estis kiel du ludantoj de tabloteniso, kiuj frapas la pilkon tien kaj reen, sed gajnas kaj ŝanĝas nenion.

Pro tio, ke ambaŭ partioj (sed precipe FF, la tiel nomataj batalantoj de la destino), kun helpo de internaciaj kaj naciaj bankoj, efektive detruis la ekonomion de la Irlanda Respubliko, granda parto de la voĉdonanta publiko seniluziiĝis pri tiuj du dekstremaj grupoj.

Konservativa

Rezulte, el ĉiuj niĉoj kaj anguloj de la politika ĝardeno, subite eksvarmis kiel kuloj novaj partioj kaj frakcioj. La plimulto, sed ne ĉiuj, montras sin pli maldekstrema ol kutime en ĉi tiu tradicie konservativa, katolika, malradikala nacio. Inter tiuj novuloj oni povas listigi kelkajn, nome:

New Vision [nju viĵon], angle, „nova vizio”: pli-malpli radikala alianco de sendependuloj.

Fis Nua [fiŝ nua], irlandgale, „nova vizio”: malgraŭ la sama signifo de la du nomoj, *Fis Nua* neniel rilatas al *New Vision*, kaj ŝajnas esti pli maldekstrema.

Ĝirigi [ejrigi], irlandgale, „leviĝu!”:

socialisma, respublikisma partio, kies insigno estas tiu, kiun ĝi mem nomas la „Esperanto-stelo”; la partio pretendas apogi Esperanton kiel internacian helplingvon (kio ne tre klarigus la zamenhofan lingvon al la irlandia publiko, ĉar *Ĝirigi* estas rigardata iom ekstremisma.)

ULA, aŭ Unuiĝinta Liva (= maldekstrema) Alianco: loza alianco, kiu inkludas la Socialistan Partion de Irlando, la premgrupon „Popolo anstataŭ profito”, asocion de senlaboruloj, kaj eble kelkajn aliajn grupojn kaj sendependulojn.

Vera miksitaj salato. Ne antaŭvidblas, ĉu iuj aŭ ĉiuj sufiĉe influos la evoluon de Irlando. Oni atendu kaj esperu.

Garvan Makaj

BALKANIO

Prezidantino elektita

Komence de aprilo elektiĝis en Kosovo prezidantino. Atifete Jahjaga, 36-jaraĝa, ricevis subtenon de 80 el 101 deputitoj en la parlamento.

La antaŭa prezidanto, Behgjet Pacolli, estis malagnoskita de la konstitucia kortumo de Kosovo pro malregulaĵoj dum la elekto. Simile okazis al antaŭa prezidanto, Fatmir Sejdiu, kiu malregule retenis la postenon de partiestro.

La novan prezidanton subtenis la ĉefaj partioj. Bojkotis ŝian elekton la partioj „Memdecido” kaj „Alianco por

la Estonteco de Kosovo”, kiuj kredis, ke la elekto daŭrigos la vivon de registaro celanta „sovaĝe” privatigi poŝtajn, elektrajn kaj aliajn servojn.

Unuiga faktoro

La nova prezidanto, kiu deĵoris kiel vicdirektoro de la kosova polico kaj kiu trejniĝis en Anglio, Germanio kaj Usono, promesis esti unuiga faktoro en Kosovo kaj reprezenti ĉiujn civitanojn. Ŝi konsideris normala traktadon kun Serbio: tio stabiligos la regionon. Ŝi volas



La nova prezidantino de Kosovo, Atifete Jahjaga, kun la parlamentestro Jakup Krasniqi.

ankaŭ kunlabori kun Eŭropa Unio kaj Usono.

La parlamento same voĉdonis, por ke post unu jaro la popolo rekte elektu sian prezidanton.

Bardhyl Selimi

EBUR-BORDO

Dividita lando, komunaj esperoj

Post monatoj da interna milito estas fine inaŭgurita kiel prezidanto de Ebur-Bordo Alassane Ouattara. Li estis elektita en novembro 2010, sed la tiama prezidanto, Laurent Gbago, rifuzis akcepti la rezulton.

Pro la sekva politika krizo mortis pli ol 3000 ebur-bordanoj, kaj fuĝis plia miliono al najbaraj landoj, kiel Burkino, Liberio kaj Ganao. Fine, en aprilo, soldatoj el la norda parto de Ebur-Bordo

bombardis la prezidantan palacon en Abidjano, la ekonomia ĉefurbo, kaj kaptis Gbago-n.

Jam suferis ebur-bordanoj pro tri jaroj da interna milito inter 2002 kaj 2005, kiam la lando estis dividita inter kristana sudo kaj islamana nordo. Intervenis Unuiĝintaj Nacioj (UN), kiuj ellaboris kondiĉojn por reunuiĝo kaj fine elektoj, kiujn dum longa tempo Gbago rifuzis permesi malgraŭ internacia premado.

Palaco

Fine cedis Gbago, kiu okazigis elektojn, sed malgraŭ ĉeurna venko de Ouattara, kun 54 % de la voĉoj, Gbago deklaris, ke venkis li per 51 % kaj insistis resti en la prezidanta palaco.

Proponis al Gbago azilon ŝtatoj kiel Usono, Francio kaj Niĝerio, sed en decembro li inaŭguris sin mem kiel prezidanton. Sekvis milito, mortoj kaj mizero tra la lando.

La inaŭguron de Ouattara ĉeestis la prezidantoj franca Sarkozy kaj niĝeria Jonathan, kune kun la ĝenerala sekretario de UN Ban Ki Moon. Nun restas la demando, ĉu la nova prezidanto povos alporti pacon al Ebur-Bordo kaj unuigi landon etne kaj religie dividitan.

Princo Henriko Oguinye/pg

ALBANIO

Prokrastita dankemo



Fine, post jardekoj, albanoj omaĝas al falintaj britaj oficiroj en la batalo kontraŭ faŝismo.

En la dua mondmilito Albanion eniris britaj oficiroj por helpi organizi la rezistadon kontraŭ la faŝismaj invadintaj armeoj. Dum bataloj kontraŭ la nazioj mortis 46 britaj oficiroj.

Post 1946 la registaro de Enver Hoxha [hodĵa] rompis rilatojn kun Britio. Oni ne memoris la helpon britan dum la milito aŭ pentris ĝin nigra. Post 1990 estis restarigitaj diplomaciaj rilatoj. Tiam oni kreis memorigejon al la 46 britoj falintaj en Albanio.

En majo, okaze de la tago de la venko kontraŭ faŝismo, civitanoj de Tirano omaĝis ĉe la memorigejo al la falintaj britaj aliancanoj. Tion aranĝas ĉiujare neregistraj organizaĵoj de veteranoj, iamaj persekutitoj politikaj, sindikatoj kaj simplaj civitanoj.

Bardhyl Selimi

EŬROPA UNIO

„Eŭropo nin devigas!”

En Belgio, flandraj kaj franclingvaj politikistoj dum jaroj diskutas la transigon de respondecoj de la federacia nivelo al la landopartoj kaj ne sukcesas trovi interkonsenton.

Sed intertempe senbrue transiras aprobo de la ŝtata buĝeto, de la financoj kaj rezulte de la financado de socia sekureco al la Eŭropa Komisiono. Laŭ planoj de la eŭropaj ministroj pri financoj ĵus en Luksemburgo, la komisiono devos aprobi naciajn buĝetojn antaŭ ilia

voĉdonado en naciaj parlamentoj.

Finnlando, Italio, Hungario, Ĉeĥio, Slovakio, Germanio kaj Nederlando havas eŭrop-skeptikajn partiojn. Ankaŭ en aliaj landoj kreskas skeptikismo rilate al Eŭropa Unio, kvankam ĝi zorgis por ekonomia kresko kaj pli da prospero.

Naciismo

Sendube la kreskanta naciismo sekve de la ekonomia krizo influis tiun tendencan. Alia kialo estas la kutimo de naciaj

politikistoj prezenti malpopularajn decidojn, dirante, ke ne eblas alia vojo, ĉar „Eŭropo nin devigas”.

Sed la plej granda kialo povus esti la perdo de kontaktoj inter la eŭropa politika elito kaj la civitanoj. La germana filozofo Jürgen Habermas tiel resumis la kritikon: „La politika elito senhonte daŭrigas sian elitajn projektojn kaj forŝtelas la voĉon de la eŭropa civitano.” La nederlanda gazeto *De Groene Amsterdammer* (La verda amsterdamanano) skribis pri „eŭrop-diktaturo”.

La Eŭropa Parlamento ne donas la impreson, ke ĝi vere regas la Eŭropan Komisionon, kaj certe ne la Eŭropan Konsilion (la kunvenon de ŝtataj kaj registaraj estroj). Ĝi reprezentas la loĝantojn de 27 membroŝtatoj sed ne la „eŭropan” civitanon.

Ivo Durwael

AŬSTRIO

Ponta popolo

La prezidanto de Turkio, Abdullah Gül, faris tritagan oficialan viziton en Aŭstrio. La celo de liaj interparoloj kun aŭstraj politikistoj estis la ekonomiaj rilatoj inter ambaŭ landoj kaj la situacio de turkdevenaj loĝantoj en Aŭstrio. Krome Gül provis trovi subtenon en la alpa respubliko por la aliĝtraktadoj de sia lando kun EU.

Komence de sia vizito la turka prezidanto varbis pri vizaj faciligoj por siaj samlandanoj. Li plendis, ke reprezentantoj de turkaj firmaoj ofte ne povas viziti arandojn en EU-landoj kaj ne kapablas prezenti siajn produktaĵojn en foiroj. Krome li emfazis, ke Turkio estas la sola lando, kiu eniris doganan unuigon kun EU, sed ankoraŭ ne estas membroŝtato.



La turka prezidanto Abdullah Gül (maldekstre) petis de la aŭstra kanceliero Werner Faymann subtenon por turka EU-aliĝo.

Integriĝo

Gül diris, ke por la integriĝo de Turkio en EU la turkoj, loĝantaj en Aŭstrio, povus plenumi tiucele pontofunkcion. Ili tamen devas ekposedi la germanan lingvon kaj ricevi koncernajn eblojn por lerni.

La aŭstra kanceliero, Werner Fay-

mann, emfazis sian starpunkton pri la aliĝtraktadoj de Turkio kun EU. La aŭstra registaro konfirmis, ke ĝi subtenas la specialan EU-partnerecon de Turkio. Li atentigis pri la politika pozicio de Aŭstrio kaj EU, nome ke bazaj valoroj kiel opini-libereco, homaj rajtoj, demokratia partopreno en la decidoj kaj gazetara libereco estu senrestrikte respektataj en Turkio.

Profitoj

Gül agnoskis, ke en la aŭstra loĝantaro la subteno por EU-aliĝo de Turkio ne estas forta. Li diris, ke oni pli bone informu la publikon pri la ebloj kaj profitoj, kiujn alportus turka aliĝo. Ĉefe aŭstraj entreprenistoj tiurilate transprenu respondecon.

En la lastaj jaroj la aŭstra-turkaj ekonomiaj rilatoj intensiĝis. En 2010 Aŭstrio kun proksimume 1,2 miliardoj da eŭroj estis la plej granda investanto en Turkio. Pro tio, laŭ la turka prezidanto, aŭstraj firmaoj certe profitus pro aliĝo de Turkio al EU. Li avertis, ke la aŭstra ekonomio suferus okaze de blokado de turka EU-membreco.

Evgeni Georgiev

NIĜERIO

Dividoj venkitaj – almenaŭ parte

Fine de majo Niĝerio inaŭguris novajn prezidanton, federacian parlamenton kaj guberniestrojn en 26 el la 36 ŝtatoj, kie okazis balotoj.

La balotoj, en aprilo, estis interesaj. Laŭ la konstitucio, la povo devas alterni inter sudo (99 % kristana) kaj nordo (99 % islama). La lasta prezidanto, Shehu Muea YarAdua, estis nordulo, kiu laŭplane restus prezidanto eble ĝis 2015. Tiam la prezidanteco revenus al la sudo.

Tamen mortis YarAdua en majo 2010 kaj la povon transprenis d-ro Goodluck Jonathan. Tiu devenas de la niĝerdelta regiono de Bayelsa en la sudo de Niĝerio. Lia ŝtato estas unu el dek, de kie venas la nafto, kiu kontribuas 90 % al la ekonomia bonfarto de Niĝerio.

Malkonsentis

Do nordaj politikistoj, kaj ankaŭ nopolitikistoj, postulis, ke nordulo aŭ islamano sekvu la mortintan YarAdua.

Aliaj niĝerianoj malkonsentis. Ili argumentis, ke Niĝerio jam sufiĉe maturas, por ke iu ajn, sendepende de etno aŭ religio, aspiru al federaciaj postenoj, ekzemple prezidanteco. Cetere liberaluloj subtenis Jonathan, bone edukitan homon, kiu jam iniciatis pozitivajn reformojn kaj enpostenigis je federacia nivelo intelektulojn kaj aliajn kapablulojn.

Tamen sin prezentis diversaj kandidatoj el la nordo, inkluzive de eksaj armeaj ŝtatestroj. Fine elektis la norduloj, kiel kompromisan kandidaton, Generalon Muhammadu Buhari, ŝtatestron inter 1983-85. Sed en aprilo, malgraŭ bomboj en diversaj ŝtatoj, kiuj mortigis centojn da niĝerianoj, la popolo turnis la dorson al etnaj kaj religiaj dividoj kaj kvereloj kaj elektis kiel prezidanton Jonathan.

Atakis

Islamaj fundamentistoj apenaŭ kredis la novaĵon. Jonathan akiris 24 milionojn da voĉoj, Buhari nur 12 milionojn.



Jonathan akiris 24 milionojn da voĉoj.

Ĝihadistoj do atakis kristanojn, loĝantaj en norda Niĝerio. Mortis miloj, kiam domoj kaj preĝejoj de kristanaj subtenantoj de Jonathan estis bruligitaj.

Aparte ŝokis la mortigo de dek t.n. junularservantoj. En Niĝerio, post universitata eduko, oni devas servi la ŝtaton dum unu jaro en alia regiono ol tiu, de kiu oni devenas. Sudanoj servas en la nordo, norduloj en la sudo. Sed unuafoje en la historio de la servo estas mortigitaj junuloj, rigardataj kiel posedaĵoj de la ŝtato kaj do iel sanktaj.

Fuĝis

La junulojn, kiuj travivis la unuan ĝihadistan atakon, kaj kiuj fuĝis al policejo, oni tie mortigis, kune kun policanoj. La internacia komunumo kondamnis la atakon. Tamen, malgraŭ sangaj makuloj tiaj, oni taksas la baloton sukcesa kaj senfraŭda.

Venis gratuloj el ĉirkaŭ la mondo, interalie el Usono, Eŭropa Unio kaj aliaj afrikaj landoj. Ili bonvenigis stabilan kaj demokratian Niĝerion, la plej homnombrian landon en Afriko, kun 130 milionoj da loĝantoj, kaj ties plej gravan nafto-produktanton.

Princo Henriko Oguinye/pg



Generalo Muhammadu Buhari partoprenas elektojn.

FERVOJOJ

Laŭ linioj de la pasinteco

Winston Churchill, kiu poste famiĝis kiel la dum milita brita ĉefministro, vidis en Kipro aŭferon tute nekonatan al nuntempaj turistoj. Churchill vizitis la iaman britan kolonion en 1907 kaj tiam veturis per trajno.

Tamen la lasta trajno funkciis en Kipro en 1951. La loĝantaro ne plu bezonis vagonarojn sur insulo karakterizita de distancoj netroaj, facile travejbleblaj per aŭto, taksio aŭ – lastatempe – aŭtobuso.

Dum preskaŭ duona jarcento, tamen, ekzistis en Kipro fervojo. Ĝin konstruis la angloj dum sia okupado, ekde 1878. Ili inaŭguris la unuan parton de la fervojo en 1905, sed la laboroj finiĝis nur en 1915.

Varoj

La fervojo, 122 kilometrojn longa, kunligis la orientan havenurbon Famagusta kun la vilaĝo Evrihu, en la nord-

okcidenta parto de la insulo. Fervojo tre utilis, ebligante i.a. transporti varojn de Famagusta al la ĉefurbo Nikozio kaj la nordo de la insulo. Gravis ankaŭ la poŝta servo. Ne hazarde pluraj poŝtoŝtacioj troviĝis ene de stacioj.

Dum la unuaj jaroj multaj personoj rigardis trajnon kiel allogaĵon. Laŭ tiaj raportoj, oni iris sub pontojn por ĝui ĝian pasadon. Sed trajnoj baldaŭ plaĉis ankaŭ kiel veturiloj. Dum la relative mallonga historio de la fervojo, pertrajne vojaĝis tri milionoj da tunoj da varoj kaj sep milionoj da pasaĝeroj.

Aliancanoj

La kipro fervojo spertis gravajn historiajn eventojn. En oktobro 1931 oni

proteste malmuntis 110 metrojn da trako: la fervojon lokuloj rigardis kiel simbolon de brita okupacio. Dum ambaŭ mondomilitoj uzis la fervojon aliancanoj, kaj bombis ĝin la malamiko. Inter 1946 kaj 1949 veturis per trajno 50 000 hebreoj al la koncentrejo de Karaolos, apud Famagusta.

Post komenca sukceso la fervojo, kiu okupis ĉ. 200 homojn, trairis inter 1932 kaj 1948 krizon. Falis enspezoj, fermiĝis stacioj, dum la daŭra plibonigo de la kipro ŝose-reto persvadis la registaron haltigi por ĉiam la fervojon. La lasta vagonaro veturis la 31an de decembro 1951 kaj fine en marto 1952 la fervojo estis tute diserigita.

Monumentoj

La stacioj estas plejparte disfaligitaj, eĉ se kelkaj fariĝis policejoj, deponejoj aŭ estas uzataj de sanservoj. En diversaj urboj troveblas monumentoj kaj t.n. liniaj parkoj, do vojoj, kiuj uzas la iaman fervojan linion.

Kromaj informoj troveblas en la libro „Ο Κυπριακός Κυβερνητικός Σιδηρόδρομος (1905-1951) / The Cyprus Government Railway (1905-1951)”, de Aleksandros Miĥail Ĥaĝiliras, eldonita en 2006 (prezo: 7 eŭroj).

Rekomendinda estas ankaŭ angla lingva film-raporto ĉe www.youtube.com/watch?v=qzTGncZ9o4c.

Roberto Pigro



ROBERTO PIGRO

Testata estas unu el la novaj fervojo-pontoj, dum lokuloj alrigardas por vidi, ĉu sub la pezo kolapsos la konstruaĵo. Aŭ ĉu ili simple ĝuas la pasadon de la lokomotivoj?



ROBERTO PIGRO

Ekzistas memorigiloj pri la fervojo en la formo de vojoj, aŭ liniaj parkoj, kie iam trafikis trajnoj.

GERMANIO

Adiaŭo al nukleo

Post la tertremo kaj cunamo kun la detruoj en la japana nuklea centralo *Fukuŝima* okazis en Germanio manifestacioj postulantaj tujan malŝalton de ĉiuj atomcentraloj en Germanio. Ankaŭ en mia loĝurbo Aŭgsburgo estis tiel.

La organizantoj de la protestoj rezignis pri paroladoj de eminentuloj kaj politikistoj. Anstataŭe ili ebligis al partoprenantoj uzi mikrofonon kaj laŭtparolilon por esprimi emociojn, timojn, postulojn kaj esperojn.

Kelkaj atentigis, ke la centralo *Gundremmingen* en distanco de iom pli ol 40 km estas tre proksima al Aŭgsburgo. Ĝia bolakva reaktoro estas simila al tiu ĉe *Fukuŝima*. La forbruligita radioaktiva materialo estas stokata en malferma ujo sen speciala protekto.

Akcidento

Aliaj atentigis, ke ne taŭgas argumenti pri rest-risko, ĉar risko ĉiam restas kaj akompanas nin. La demando ne estas, ĉu akcidento eblas, sed kiam. Homoj

partoprenantaj loteriojn kredas, ke la tre neverŝajna granda feliĉo povas okazi venontan semajnfino, malgraŭ la fakto, ke ĝi okazos al ili unu fojon en 300 000 jaroj. Samtempe ili kredas, ke la granda malfeliĉo de eksplodo en atomcentralo neniam okazos, kvankam ĝi estas dekomble pli verŝajna.

Aktivuloj proponis ŝanĝi la elektroprovizon kaj estontece uzi nur „senatoman” kurenton el vent- kaj sun-energio, akvoŝofito ktp. Kelkaj postulis de la loka elektroprovizanto ne plu uzi atomkurenton. Loke la proporcio de atomkurento estas inter 13 kaj 14 %.

Moratorio

Multaj kritikis la tujan reagon de kancelierino Merkel, kiu ordonis nukle-

an „*moratorion*”. En la germana lingvo „*Moratorium*” estas apenaŭ konata fremdvorto, kiu signifas simple „prokrasto”. Ĉu ŝi ordonas malŝalti la plej malnovajn nukleajn centralojn – por post ioma paŭzo esperi pri la forgesemo de la popolo kaj denove aktivigi ilin?

En 2000 la Federacia Respubliko Germanio kontrakte interkonsentis kun la atomindustrio iom post iom rezigni pri atomelektra energio. La ruĝ-verda registaro en 2002 precizigis, ke la atomcentraloj funkcii nur 32 jarojn kaj ke ne estos konstruataj novaj.

Permeso

En oktobro 2010 la parlamento decidis plilongigi tiun tempon tiel, ke la sep atomcentraloj de la tempo antaŭ 1980 havu permeson funkcii pliajn ok jarojn, la dek pli novaj pliajn 14 jarojn.

Post la eventoj ĉe *Fukuŝima* Merkel ordonis rapidan plian kontrolon de la plej malnovaj atomcentraloj, t.n. stres-teston. Fakuloj klarigis, ke en tri monatoj tio tute ne eblas. Fakte oni ne



JOMI IPELKOEFER



JOMI IPELKOEFER

Tra Germanio okazis protestoj kontraŭ plua funkciado de nukleaj centraloj.

praktike testis aŭ ekzamenis, sed pride-
mandis la respondeculojn de la centraloj
pri la sekureco de la konstruaĵoj.

Aviadilo

La ĉefa demando estis, ĉu la betona
ŝirmilo de la reaktoro estas sufiĉe fortika
por protekti eĉ kontraŭ aviadilo-kraŝo.
La rezulto estis publikigita en la kutima
maniero: oni pretendis seriozecon kaj
sinceron.

Kvar nukleaj centraloj laŭdire estas
nesufiĉe fortikaj por protekti kontraŭ
kraŝo de eta aviadilo. Kelkaj estas
nesufiĉe fortikaj kontraŭ mezaj aviadi-
loj, kaj neniuj betonkirasoj ŝirmas kontraŭ
kraŝo de granda pasaĝeraviadilo.

Stokado

La registaro rapide kreis tiel noma-
tan etik-komisionon, kiu rekomendis
malŝalti ĉiujn atomcentralojn en Germa-
nio dum jardeko, do ĝis 2021, eble eĉ

pli frue. Etike postulendas ankaŭ solvi la
demandon, kie kaj kiel stoki la forbrul-
igitan materialon, radioaktivan ankoraŭ
dum jarmiloj. La ĝisnuna provizora
stokado estas nesufiĉa.

Fine la tri regantaj partioj, CDU
(Kristdemokrata Unio), CSU (Kristsoci-
ala Unio) kaj FDP (Liberec-Demokrata
Partio), interkonsentis ĝis 2022 malŝalti
la atomcentralojn. Samtempe Merkel
postulas stres-teston por ĉiuj atomelek-
traj centraloj mondvaste. Germanio
ankaŭ ne importu atomkurenton el aliaj
landoj.

Radioaktiveco

Ankaŭ la nuklea centralo *Gundrem-
mingen* apud Aŭgsburgo estos malŝaltita
en 2022. Sed kion poste? Neniam ĝis nun
estis malkonstruita komparebla atom-
centralo ie en la mondo. Profesoro Alois
Loidl de la universitato de Aŭgsburgo
bonvenigas la malŝalton, sed avertas, ke
la radioaktiveco de la konstruaĵo estas

tiom danĝera, ke oni prefere ne tuŝu ĝin
dum 20 jaroj kaj nur poste malkonstruu
la centralon.

Dum multaj civitanoj postulas tujan
malŝalton de la centraloj, ties manaĝeroj
asertas, ke tio ne eblas. Krome, se oni
tuj malŝaltus la sep reaktorojn mallabo-
rantajn dum la moratorio, la ŝtato per-
dus unu miliardon da impostoj. Necesas
novaj subvencioj por evoluigi novajn
teknologiojn kaj por plukonstrui kurent-
reton.

Intertempe okazis protestoj kontraŭ
atomcentraloj en Germanio. Fine de
majo 160 000 homoj en multaj urboj
postulis: „Ne plilongigu la funkciadon
de atomcentraloj. La registaro reprezen-
tu ne la interesojn de la elektrokonzer-
noj, sed la interesojn de la popolo.”

Centmiloj da homoj memoras la bil-
dojn pri *Fukuŝima*, la mensogojn de ties
manaĝeroj, la sekvajn paneojn, kaj ili
daŭrigas siajn protestojn.

Jomo Ipfelkofer

GULAGOJ

Kvarlingva „muzeo”

La vorto „gulago” famiĝis, kiam
Aleksandr Solženicin verkis sian
Arkipelagon de Gulago, 1918-1956,
eldonitan unue en Francio en 1973. Nur
post la tiel nomata restrukturiĝo, aŭ pe-
restrojko, povis legi ĝin rusoj en la rusa.

Tiu arkipelago estis kvazaŭ aparta
lando, aparta mondo, en kiu vivis
arestitoj, ekzilitoj, banditoj aŭ opinio-
kontraŭuloj. En la gulago homoj devis
senpage kaj intense labori: la plimulto
mortis surloke.

Vivprotokoloj

Kolektitaj kaj konservataj estas di-
versaj aĵoj, skribaĵoj aŭ fotoj, pri la
ekzilo. Kelkaj ekzilitoj ankoraŭ vivas.
Sekve esploristoj el 15 landoj kunlabo-

ris, kune kun Radio Francio-Internacia
kaj la franca esplorcentro CNRS, por
krei retan „muzeon” el la vivprotokoloj
de tiuj ekzilitoj.

La muzeo entenas ĉefe son-inter-
vjuojn. La ideo estas, ke homoj el landoj
okupaciitaj de Sovetio, kiuj travivis kaj
postvivis deportadon, rakontu pri siaj
travivaĵoj. Estis intervjuitaj pli ol 150
atestantoj, ĉefe el Orienta Eŭropo. La
intervjuoj estas interesaj, vivplenaj kaj
emocivekaj.

Temoj

Eblas viziti tiun muzeon diversma-
niere: laŭ temoj (ekzemple malsato, ar-
baro, morto de Stalino), laŭ biografioj,
mapoj aŭ kronologio. La muzeo estas

vizitebla en la pola kaj en la rusa, en la
franca kaj en la angla ĉe [museum.gulag-
memories.eu](http://museum.gulag-memories.eu).

Indas la projekto. Jam vaporiĝas me-
moroj pri gulagoj. Ŝajnas, ke loĝantoj
de Jekaterinburgo nun scias kiel atingi
la plej proksiman superbazon, sed ne
la memorejon al la 45 000 Stalin-vikti-
moj, kiuj konstruis en teruraj kondiĉoj
la aŭtoŝoseon al Moskvo.

Renée Triolle

**Artikolojn pri la vivo
en via regiono sendu al
moderna_vivo@monato.net**

BRITIO

Protesto gilotinita

La 29an de aprilo okazis en Londono la edziĝo de William [ŭiljam], la nepo de la brita reĝino Elizabeth, kaj Kate Middleton [kejt medlten]. La vendredo estis deklarita nelabora tago en Britio.

Plejparte por britoj la tago signifis nur pli longan semajnfino. Tamen inter tiuj, kiuj iel interesiĝis pri la ceremonio, estas du kontraŭaj opiniogrupoj. Unu volis aktive festi la eventon; la alia volis protesti kontraŭ multekosta edziĝa ceremonio de riĉuloj.

Teatraĵo

En demokrata lando oni rajtu pace manifestacii, ekzemple kontraŭ edziĝo

tia, sed bedaŭrinde tio ne ĉiam eblas. Ekzemple Chris Knight [kris najt], 68-jara profesoro pri arkeologio, estras stratteatrogrupon. Tiu planis teatraĵon, montrantan la gilotinadon de membroj de la reĝa familio, sur londona placo.

Tamen dum la vespero antaŭ la edziĝo okazis absurdaĵo. Proksimume dek policanoj alvenis al la domo de profesoro Knight por aresti lin kaj lian 60-jaraĝan amikino, plus 45-jaraĝan aktoron, kiu jam portis kostumon de ekzekutisto de la 18a jarcento.

Televido

La novaĵo pri la stulta situacio disvastiĝis pro tio, ke televido-skipo,

kunlaboranta kun la teatrogrupo por fari programon pri kontraŭuloj de la edziĝo, ĉion filmis. La protestantoj estis arestitaj pro „konspiro ĝeni la publikon”. Se la instancoj pli ĝenerale aplikus akuzon tian, preskaŭ ĉiaspeca stratprotesto en Britio estus kontraŭleĝa.

Fine, evidente, oni ne procesis kontraŭ la tri akuzitoj. Ili sidis en polica malliberejo ĝis la fino de la edziĝa ceremonio.

Klare, Britio ne estas ia Norda Koreio, kiel volas aserti kelkaj protestemuloj. Aliflanke neniel senmakulas la politika libereco en Britio.

Peter Bowling



Wouter Weylandt, el Flandrio, falegis kaj, frapinte la kapon kontraŭ la asfaltan, mortis.

Sporto estas pasio, sporto estas ofero. Sed sporto estas fojfoje tragedio. Kadre de biciklado-kon-

BICIKLADO

Tragedio homa kaj sporta

kurso, la Rondiĝo de Italio, juna kaj promesplena sportisto, Wouter Weylandt [ŭoŭtr ŭejlant], el Flandrio, falegis kaj, frapinte la kapon kontraŭ la asfaltan, mortis.

Abrupte, sed „ne suferinte”, laŭ kuracistoj, li adiaŭis ne nur karieron dum jaroj revitan kaj kun persisto konstruitan, sed ankaŭ kunulinon, kiu baldaŭ lin patrigus.

Funebre

La morto de la belga atleto, la 9an de majo, skuis la organizantojn kaj la 206 partoprenantojn. Ĉi-lastaj propravole dediĉis la sekvan etapon de la rondo al sia iama kolego. Funebre, silente, dum

la publiko flirtigis la numeron (108) de la mortinto, alternis ĉe la kapo la teamoj, transformante ĉi tiun kvare plej longan etapon (216 km) en emocian ses-horan procesion. La celrubandon, en la urbo Livorno, kune tranĉis la teamanoj de Weylandt per brakumo multsignifa kaj senprecedenca.

Fine de la tago la usonano Tyler Farrar retiriĝis de la konkurso. La du biciklistoj, membroj de malsamaj teamoj, estis delonge amikoj: ili kuntrejniĝis kaj vivis en la sama urbo. La patro de Weylandt, tuj alveninta Italion, invitis male la atletojn ne forlasi la konkurson. La spektaklo estu daŭrigota.

Roberto Pigro

JURO

Davido Valonio kontraŭ Goliato *Google*

La informentreprene *Google* ne plu rajtas publikigi fotojn aŭ artikolojn de franc- kaj german-lingvaj valonaj eldonistoj en siaj retejoj. Tion konfirmis la brusela apelacia kortumo. La kortumo punos per kompulsopago de 25 000 eŭroj por ĉiu tago da prokrasto.

La apelacia kortumo per tio konfirmas la verdikton en unua instanco de 2007. La proceso temas pri *Google News*, la retejo en kiu *Google* kolektas novaĵrakontojn de diversaj enretaj gazetoj. La valonaj gazetoj opinias, ke *Google* devas kompensi ilin por la uzado de iliaj novaĵoj.

Aŭtoraj rajtoj

La informentreprene argumentas, ke ĝi nur referencas al novaĵretejoj kaj ke ĝi per tio ne lezas aŭtorajn rajtojn. Krome *Google* opinias, ke estu aplikata la usona leĝo, ĉar ĝi el Usono publikigas en siaj serviloj la artikolojn de belgaj gazeteldonistoj.

La juĝisto en unua instanco refutis tiujn argumentojn, post kio *Google* apelaciis. Sed la apelacia kortumo grandparte konfirmis la verdikton, inkluzive de la kompulsopago. Laŭ la kortumo la belga leĝo aplikeblas kaj *Google* lezas la rajtojn de la aŭtoroj, senpermesite publikigante ligilojn al aliaj artikoloj kaj kopianta iliajn fotojn.

Ĉi-momente en *Google News* ne plu estas troveblaj artikoloj de valonaj gazetoj. Ŝajnas do, ke provizore la malgranda Davido gajnis. Sed kiom longe?

pp

USONO

Barbara minoritato

El 50 usonaj ŝtatoj, Kalifornio kaj Teksaso enhavas la plej grandan nombron de prizonuloj atendantaj mortopunon. Post kiam ĉesis enlanda produktado de la ĝis tiam uzata mortigilo, Kalifornio kaj kvin aliaj ŝtatoj serĉas anestezan injektaĵon. Ĉi-jare, tamen, rekomenciĝos produktado de tiu ĉi tribunale devigata drogo.

Intertempe estis distribuata drogo farita en Britio kaj neleĝe, sekrete, akirita. La injektaĵo ne estas aprobita de landaj instancoj respondecaj pri drogoj kaj nutraĵoj kaj pri importado. Dum proceso montriĝis, ke kelkaj funkciuloj tro rapide kaj sen necesa kvalito-kontrolo

enirigis la anstataŭan drogon el eksterlando.

Aktuale, en Kalifornio, 710 homoj atendas mortopunon per injekto. Tamen oponentoj de la mortopuno proponas anstataŭe vivdaŭran prizonrestadon. Ili atentigas, ke mortopuno estas aplikata pli ofte ĉe membroj de rasaj minoritatoj. Krome, la kosto de tiu ĉi „barbara kutimo” en Kalifornio atingas miliardon da dolaroj.

Viktimoj

Tiajn grandajn sumojn, diras oponentoj, oni povus utiligi por plibonigi vivkondiĉojn kaj solvi aliajn socialajn

problemojn, kiuj tuŝas kaj krimulojn kaj viktimojn.

Nun la Usona Unio de Civitana Libereco rekomendas ŝanĝojn en la punkodo: 1. Oni ĉesu enprizonigi pro malgrandaj deliktoj; 2. Oni faciligu edukadon kaj akiradon de diversaj kompetentecoj; 3. Oni helpu eksprizonulojn vivi pace en la komunumoj; 4. Oni subtenu servojn por krim-viktimoj; 5. Oni kreu gvidliniojn rilate polican gvataĵon; kaj 6. Oni atentu pli multe pri miskonduto de policistoj kaj aliaj funkciuloj kaj ŝanĝu la etoson pri misuzo de povoj.

Elson B. Snow

La marmora groto Gadime

La marmora groto Gadime estas la sola ĉi-momente vizitebla el inter dekoj da kavernoj en Kosovo. Ĝi troviĝas je ĉirkaŭ 20 km sude de la ĉefurbo Prištino. La groto estas vere mirinda pro siaj belegaj stalagmitoj kaj stalaktitoj. Tuj post la liberiĝo de Kosovo, junio 1999, la aŭtoro plezure vizitis ĝin trifoje kaj de tiam rekomendas ĝin al vojaĝantoj.


La groto estis malkovrita tute hazarde en la jaro 1969 de vilaĝano Ahmet Asllani, kiu serĉis ŝtonojn por sia nova domo. Li estis ŝokita de tio, kion li vidis ene. Poste la groton esploris fakuloj el la eksa Jugoslavio, aparte profesoro Jovan Petroviĉ kaj speleologiaj kluboj el Vojvodino. Oni taksas ĝian aĝon je 80 milionoj da jaroj.

Ĝi kuŝas je 584 m super la marnivele. La groto fariĝis vizitebla por turistoj en la jaro 1976. Ĝi longas 1500 m, sed


eblas trarigardi nur 800 metrojn de unu el ĝiaj tri etaĝoj. Ene la temperaturo estas 9,6-16 °C. En ĝi estas lageto kun areo de 500 kvadrataj metroj, kaj je 6-10 m sube trafluas rivereto Klusure.

En la groto estas kelkaj ejoj. Unu el ili estas la „ejo de geamantoj”. Oni nomas ĝin tiel pro stalagmito kaj stalaktito „Romeo kaj Julieta”, alproksimiĝintaj unu al la alia je distanco de nur 5 cm. Laŭ fakuloj ili povus tuŝi unu la alian nur post 1 500 000 jaroj, ĉar por 1 mm estas bezonataj 30 000 jaroj! Tre interesaj estas ankaŭ aliaj ejoj kaj koridoroj. Sur la plafono de unu el ili troviĝas marmoraj elstarajoj, kiuj malgraŭ la gravito turniĝas supren! Neniu ĝis nun povas ekspliki tiun evoluon. Laŭ legendo leporo enveninta la groton eliris post kelkaj tagoj en Janjevo (apud Gračanica) – loĝloko, situanta aerlinie je 12 km.

Antaŭ kelkaj jaroj oni komencis



BARDHYL SELIMI



BARDHYL SELIMI



BARDHYL SELIMI

ĉerpi trinkeblan akvon el ĝi por la najbaraj vilaĝoj pere de pumpstacio. Karakteriza por la groto Gadime estas formacioj de marmoro kaj pluraj mineraloj, inter kiuj la rara mineralo aragonito.

Bardhyl Selimi

Kiel savi la planedon?

Dum politikistoj debatis en Cancún, Meksiko, kiel savi la planedon, en decembro de 2010 ĉe Unesko en Parizo kunvenis neregistaraj organizaĵoj (NROj) por diskuti, kiun rolon ludu la civila socio. Kiel kune difini, kio estas necesa? Kiel eduki infanojn kaj aliajn por daŭra kaj justa evoluo?

Konstateblas, ke riĉaj, evoluintaj landoj strebas malgrandigi sian konsumadon de energio. Ili en 2005 produktis 40 % malpli da CO₂ ol en 2000, fabrikante malpli energivorajn aŭtojn aŭ hejtilojn. Eblus duobligi la energio-ŝparon, sed intertempe aliaj landoj industriiĝas. Ne eblas malpermesi al civitano el Rusio, Barato aŭ Ĉinio aĉeti aŭton. Tamen necesas 200 milionoj da jaroj, por ke plantoj iĝu petrolo aŭ karbo, kaj la homaro ne povas atendi pliajn 200 milionojn da jaroj por ilin rehavi.

La financa krizo kreis obsedon al kresko. Dum ĉiujare 500 000 virinoj

mortas dum akuŝo, dum unu homo el ses ne havas elektron, dum ni konsumas en unu jaro naturajn resursojn, kiuj povas renoviĝi nur en 15 monatoj, la plej riĉa kvinono el ni konsumas pli ol la malriĉula duono. La monda loĝantaro kreskis je 40 % en la lastaj 20 jaroj (oni prognozas 9 miliardojn en 2050) kaj konsumad-ekonomio iĝis modelo. Ni „konsumas” 1,2 terojn ĉiujare, do endanĝerigas niajn posteulojn. Reklamado forte kontribuas al tipa konsum-vivo: ŝanĝi poŝtelefonon ĉiun jaron se ne ĉiun trian monaton, havi la lastmodan televidilon ktp. Baldaŭ ĉiuj niaj resursoj

troviĝos ne en minejoj sed en rubaĵejoj. Tamen iuj ankoraŭ vivas ekster tiu kreskomodelo: ekzemple indianoj en Amazonio ne postulas aŭtoŝoseojn. Ilia „ĉiovendejo” estas la arbaro, en kiu ili trovas nutraĵon kaj konstrumaterialon. Ilia ekologia spuro estas nula.

Kion proponi?

Ĉar estis kresko kaj progreso en Eŭropo kaj Japanio post la dua mondmilito, ekestis la ideo ke la sama modelo devas alporti saman progreson tra la tuta mondo. Evidentiĝas, ke tiu sistemo kreis senton pri supereco ĉe la havantoj kaj dependiĝon de la nehavantoj, pluan koloniatan menscon, nepartoprenon de la koncernaj loĝantaroj ktp. Nun venas la momento pripensi ion novan, sed neniu fidus la registarojn aŭ la ekonomikistojn por krei alitipan modelon. Restas la lokaj eksperimentoj kaj spertoj de la NROj. Eĉ se ekonomia nivelo restas la baza kriterio, elstarigu solidareco kaj socia ligo, dividiĝu la riĉeco (ekonomia sed ankaŭ kultura), uziĝu la lokaj scioj kune kun la sciencaj, faciliĝu la aliro al patentoj, multiĝu interŝanĝoj anstataŭ konkurenco.

Vivu la kultura diverseco

Kulturo nasas enspezojn. Kultura turismo reprezentas nun 40 % de la tuta turismo kaj iĝis motoro de disvolviĝo en pluraj mondopartoj. Ĝi ankaŭ estas peranto por rilati kun la medio (pere de lokaj tradiciaj scioj kaj interago inter homo kaj naturo) kaj ĝi estas stimulo de disvolviĝo. Protekti kulturen diversecon kreas viveblan medion. Tio estis la konkludo de Marie-Ange Théobald, estro de la NRO-sekcio de Unesko.

Renée Triolle



Energio de la tegmento

Aŭstroj uzas la tegmenton de sia domo kiel energifonton. Jam 4,5 milionoj da m² da sunkolektiloj estis instalitaj en la lando, 250 000 hejmoj jam havas sunkolektilojn sur la tegmento. Al ili aldoniĝas ĉiusemajne miloj. Tiamaniere estas produktataj 1400 gigavat-horojn da energio – tiom multe, ke tutan vintron oni povus hejti ĉiujn hejmojn en la federacia lando Vorarlberg (okcidenta Aŭstrio), deklaris Roger Hackstock, afergvidanto de la sun-energia asocio *Austria Solar*.

Tamen la sunkolektiloj kovras ankoraŭ apenaŭ 1,5 procentojn de la bezonata energio por varma akvo kaj hejtado en Aŭstrio. Ekzistas granda potencialo por evoluo en tiu sektoro, ĉar laŭ esploro ĝi povus atingi 40 procentojn, informis la oficejo de la ministro pri naturmedio. Tamen nuna celo estas altigi la hodiaŭajn rezultojn ĝis 10 pro-

centoj post kelkaj jaroj, diris Hackstock. Lastatempe post multjara kresko la branĉo spertis „historian malaltiĝon”. En Aŭstrio malpliigis la vendoj de kolektiloj je 20 procentoj kaj entute, kune kun la eksportoj, duoniĝis la negocoj pri kolektiloj en du jaroj. En la branĉo oni devis maldungi laboristojn, krome 3 el la 70 produktantoj kaj komercistoj devis deklari bankroton.

Nova kresko

Nun oni esperas je nova kresko. Konsiderante la eksplodantajn petrolprezojn kaj la rean diskuton pri kurento el la nukleaj elektrejoj, la energiŝparado fariĝis aktuala temo. La interesiĝo pri la sunkolektiloj ege plialtiĝis. Tiun fakton konfirmas ankaŭ instalistoj. „Okazas ĝenerala ŝanĝo en la pensado direkte al konsciiĝo pri la naturmedio”, opinias Theodor Seebacher, ĉefo de entreprenis-



Sunkolektiloj kovras ankoraŭ apenaŭ 1,5 procentojn de la bezonata energio por varma akvo kaj hejtado en Aŭstrio.

Konsiderante la eksplodantajn petrolprezojn kaj la rean diskuton pri kurento el la nukleaj elektrejoj, la energiŝparado fariĝis aktuala temo.

ta fakasocio en Salcburgo. „La sunradio-instalaĵoj hodiaŭ estas ĉe la domkonstruado por ni teknika bezonaĵo.” Postulataj estas ĉefe instalaĵoj, kiuj povus kovri krom la bezonoj de varmakvo ankaŭ parton de la hejtbezonoj.

Se 250 000 hejmoj uzis ĝis nun 90 procentojn de la sunenergio por varma akvo, nuntempe tri kvaronoj de la aĉetataj instalaĵoj povas kovri ankaŭ parton de la hejtbezonoj, laŭ Hackstock. Por unu familia domo la instalaĵo kun 15 m² da kolekt-areo kaj 1000 litroj da varmakvujo, kune kun la instalado, kostas entute 12 000 eŭrojn. Oni povas kovri per ĝi trionon de la hejtbezonoj, la ŝparo estas 350 ĝis 700 eŭroj jare. Notindas, ke ĝis 30 procentojn de la instalaĵprezo konsistigas investo de federaciaj landoj kaj komunumoj.

La situacio ĉe la sunĉeloj estas alia ol ĉe la sunkolektiloj. Ĉe ĝi la sunradioĉeloj ne varmigas akvon, sed rekte produktas elektran kurenton. Danke al la plialtigo de la financa subteno, altiĝis lastatempe ilia parto. Tamen ĝi estas minimuma – nur 0,47 procentoj de la tuta elektroproduktado.

Evgeni Georgiev



Aŭstroj uzas la tegmenton de sia domo kiel energifonton.

Renkontiĝo

Pasis dek tagoj ekde la lasta renkontiĝo postbakalaŭra de nia klaso. Tiaj renkontiĝoj okazas ordinare nur en ĉiu deka jaro, sed kiam ni fariĝis kvindekjaruloj, ni decidis organizi tiujn renkontiĝojn en ĉiu kvina jaro. Ja dum dek jaroj povas okazi multo ... Kelkaj gesamklasanoj jam ne plu vivas, kaj ankaŭ nia klasestro jam forpasis.

Helena ne venis al la lasta renkontiĝo, kaj mi ne estis certa, ĉu ĉi-

foje ŝi venos. Ni estis amikinoj en la mezlernejo, kaj mi scias, ke ŝi ne ŝatas bankedojn. Ŝi estis stranga knabino, la sola en la klaso, kiu ne sciis danci kaj timis kanti, pensante, ke ŝia voĉo estas malbela. Ŝi ne havis multajn amikinojn. Ŝi malaprezis tiun malsinceran amikiĝon, kiu karakterizas la virinajn amikecojn. Mi pensas, ke ŝi amis min pli profunde, ol mi ŝin amis, kaj nun mi hontas pri tio.

**Renkontiĝo
post jardekoj estas
renkontiĝo
kun niaj iamaj memoj,
kiam
ni estis junaj.**

Ankaŭ mi estis tiutempe iom snoba; mi preferis amikiĝi kun la plej popularaj knabinoj en la klaso, kaj ŝi ne apartenis al ili. Kiom da prestiĝo ŝi havis, tio rezultis ĉefe el tio, ke nia instruistino pri desegnado aprezis ŝiajn pentraĵojn; vere ŝi estis la plej bona en la klaso. Ŝi estis tre modesta knabino, mallaŭta, kiu evitis la knabojn. Verdire ŝi timis ilin. Ĉiuj miregis, kiam ŝi, unua el la klaso, edziniĝis. Kiam iu dum la bankedo menciis tion, ŝi estis surprizita. Mi kredas, ke ŝin neniam interesis, ĉu ŝi edziniĝis unua aŭ lasta; pri tio mi estas konvinkita, ĉar mi plej bone konis ŝin. Ŝi neniam vivis en la realo, sed ie en la mondo de la arto. Ŝi volis „montri sin” pere de kreaĵoj. Funde de la animo ŝi deziris, ke oni amu ŝin pro tio, kiu ŝi vere estas, ne pro tio, kiel ŝi estas vestita. Tiamaniere oni ne vekas intereson de la knaboj. Sed ŝi ne deziris allogi knabojn, por kiuj gravas nur la eksterajoj. Estis surprizo por ni ĉiuj, ke ŝi tamen trovis amanton, kiu ŝin edzinigis, eĉ antaŭ ĉiuj knabinoj de nia klaso. Mi kredas, ke ŝi neniam pensis, ke ŝi superas nin per tio. Stranga knabino ŝi estis, sed modesta, pro kio, eĉ se ŝi ne apartenis al la „stelulinoj”, oni ne malŝatis ŝin, kaj kelkaj eĉ simpatiis kun ŝi.



PINK SHERBET



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe fel-monato
www.retbutiko.net.

En la korto de nia iama lernejo ni kolektiĝis antaŭtagmeze. Ni gaje interbrakumis, interkisadis, sed enpense ni diris: „Ho, kiel ŝi maljuniĝis!”

Renkontiĝo post jardekoj estas renkontiĝo kun niaj iamaj memoj, kiam ni estis junaj. Fakte la kerno de la karaktero ne ŝanĝiĝas. Sed la apero de Helena inter ni estis surprizo por ĉiuj. Ŝi estis ŝi, tamen iu alia: ne malmodesta, tute ne, sed ŝia konduto sugestis iun afablan memfidon, kiu estis nova por ni, kiuj konis ŝin antaŭ kvardek jaroj. Samklasaniĝo eĉ menciis: „Vi ŝanĝiĝis en bona senso.” Knabo (ho, „knabo” sesdekjara!) sincere diris, ke ŝi tute ne maljuniĝis. Kaj ŝi respondis kun afabla rideto: „Do, ĉiam mi estis tiel malbela?”

Ni konsumis la tagmanĝon en restoracio, trinketis, babiladis. La plej populara, plej sukcesa knabino de nia klaso delonge forpasis post tumulto vivo: multaj amantoj kaj divorco. Aliaj tri mortis pro malsano, ankaŭ la plej bona sportulino de nia klaso. Mi jam sciis tion, ĉar mi ĉeestis ankaŭ la antaŭan renkontiĝon; nur por Helena tio estis novaĵo. La glasetoj iom post iom malpleniĝadis, la babilado vigliĝis: „Ĉu vi memoras, kiam...” komencaj frazoj plioftiĝis. Ni estis gemaljunuloj, kaj la orkestro elektis la repertuaron laŭ nia supozata gusto. Foje eksonis la malnova melodio „*Bésame...*” Mi rimarkis larmojn en la okuloj de Helena, kvankam ŝi volis tion kaŝi. Ni duope foriris el la restoracio pli frue; la aliaj samklasanoj ankoraŭ restis; kelkaj ekdancis. Helena mendis ĉambron en hotelo, sed mi invitis ŝin al mi por ankoraŭ babiladi iomete. La vera surprizo trafis min tiam, kiam ŝi konfesis pri la unusola granda amo de sia vivo. Jam la fakto, ke tia knabino, kiu ĉiam evitis, timis la knabojn, edziniĝis unua el la klaso, estis surprizo, sed kion ŝi nun rakontis, eĉ pli multe min surprizis. Ja ni jam estas avinoj, kaj ŝi parolis pri tiu amo, kvazaŭ ŝi estus junulino. Ŝi parolis en sia karakteriza, mi diru, „viktoriana” stilo pri la amrilato. Videble ŝi „cenzuradis” sin; ankaŭ la nomon de la viro ŝi ne malkaŝis („ja vi ne konis lin”). Mi

eksciis, ke li jam forpasis de kelkaj jaroj, sed antaŭ lia morto ili jam disiĝis, pro lia malfideleco. „Ja vi konas min. Por mi ne plej gravas la sekso. Nur tio ne sufiĉas.”

Kiam ŝi diris tion, sur ŝia vizaĝo ekaperis iu hontema rideto. „Sed... mi devas konfesi, ke per li mi eksciis, kion signifas esti vere allogata de iu. Ne imagu scenojn, kiel en la nuntempaj filmoj. Mi ne deprenis lian ĉemizon aŭ simile, sed post niaj maloftaj renkontiĝoj mi sentis, ke orkestro eksonas en tuta mia korpo, kun multaj instrumentoj mi ŝvebis irante sur la strato, kaj mi amis ĉiujn preterpasantojn. Lia voĉo estis la plej rava muziko por mi. Tiu kanto, '*Bésame...*' lin memorigas al mi”, ŝi finis.

Poste kun hontema rideto ŝi aldonis: „Sufiĉas. Mi jam eldiris multajn stultaĵojn. Jam estas la tempo adiaŭi vin kaj iri al mia hotelo. Morgaŭ matene mi forvojaĝos. Ni renkontiĝos... post kvin jaroj”, ŝi aldonis kun melankolio. Kiu scias, ĉu ni vivos post kvin jaroj?

Ŝi foriris, sed mi longe kuŝis ankoraŭ sendorma. La kerno de la karaktero restas senŝanĝa, oni kredas. Sed al mi ŝajnas, ke mia amikino fariĝis alia homo. Aŭ ĉu mi ne konis ŝin sufiĉe? Verdire, mi estas iom envia. Mi konis antaŭ la edziniĝo plurajn virojn. Poste mi enamiĝis al mia edzo, sed mi ne memoras tiel profundajn sentojn, ke mi eĉ nun emociiĝu, ekaŭdinte kanton kaj pensante pri iu ajn el la viroj, kiujn mi konis. Kaj mi kredas, ke la plejmulto el la virinoj estas tiaj. Alvenas la tempo de la enamiĝo, kaj oni kredas, ke tio estas la amo, se al ni plaĉas reciproke viro kaj virino. Ni geedziĝas, naskas, plenumas la ĉiutagajn devojn, forgesas la romantikon. La vivo fariĝas griza. Iuj komencas drinki, aliaj postĉasas monon, sed ĉu vere tio estas la vivo? Helena memoris ie legitan citaĵon, ke ne gravas, kiom longe ni vivas; gravas nur, se ni havis en la vivo unu horon, por kiu valoris naskiĝi.

Kaj mi min demandas, ĉu mi havis tian horon?

Lenke Szász

Akutagawa: „patro de la japana novelo”

Akutagawa Ryūnosuke estis unu el la unuaj aziaj aŭtoroj, kiuj kombinis sian hejman literaturan tradicion kun la eŭropa, kaj li estis ankaŭ unu el la unuaj antaŭmilitaj japanaj aŭtoroj, kies verkoj vaste legiĝis ekster Japanio.

Akutagawa naskiĝis en 1892. Ne longe poste lia patrino frenezigis, kaj li estis adoptita de sia onklo. De frua aĝo li interesiĝis pri klasika ĉina literaturo, kaj poste li studis la anglan kaj per la angla konatiĝis kun vasta gamo da eŭropa literaturo: Gogol, Poe, Swift, Strindberg, Mérimée, Nietzsche, Dostojevskij, Balzac, Tolstoj, ...

Akutagawa neniam verkis romanon, sed li produktis, krom poemoj kaj eseoj, ĉirkaŭ 150 novelojn. Siajn plej konatajn verkojn li produktis en la lasta jardeko de sia vivo, komencante per „La nazo” en 1916. Akutagawa estis perfektisto rilate stilon, kontraŭis naturalismon en literaturo kaj kredis, ke lirismo pli gravas ol strukturo en rakonto. Liaj pli fruaj verkoj reinterpretas klasikajn verkojn kaj historiajn okazaĵojn, sed la malfruaj verkoj estas pli aŭtobiografiaj. Li ofte favoris makabrajn temojn.

En la fino de sia vivo Akutagawa spertis halucinojn kaj timis, ke li frenezigos, same kiel la patrino. En 1927, nur 35-jara, li mortigis sin. Tamen lia mallonga literatura kariero sufiĉis por famigi lin: li restas unu el la plej konataj japanaj novelistoj, kaj la plej prestiĝa literatura premio en Japanio estas nomata laŭ li.

Noveloj de Akutagawa Ryūnosuke, tradukitaj de Konisi Gaku, ne estas la unua esperanta traduko de Akutagawa: ĉi tiu libro utile listigas kvin antaŭajn

librojn, en kiuj aperis sume 18 aliaj noveloj de Akutagawa. Konisi Gaku aldonas 8 novelojn, el kiuj unu („La konko”) estas kolekto de 15 miniaturoj.

La ok noveloj estis verkitaj inter 1918 kaj 1926. „Aranea fadeno” estas budhisma fabelo. „La diulo” (kiu jam aperis en *La Ondo de Esperanto*) similas al eŭropa legendo, sed kun alia religia fono. „La virino” priskribas la vivon de araneo. La aliaj noveloj ŝajnas memoraĵoj, ĉar ili povus priskribi verajn okazaĵojn, sed kun pli da poezieco kaj simbolismo ol kutima anekdoto aŭ taglibro. „La oranĝoj” temas pri unu frapa sceno, spertita dum trajnvojaĝo. „La malvarmo” komenciĝas per konversacio inter fizikistoj kaj finiĝas per morto en fervoja akcidento. En „Frua printempo” la protagonisto atendas sian koramikon en reptilia sekcio de muzeo kaj meditas, dum ŝi ne venas. Kaj „Carmen” temas pri rusa aktorino en opero.

Mi ĝuis la novelojn. Ĉe kelkaj el ili mi havis iomete la senton, ke eble mi pretervidis ion kaj ne plene komprenis, sed tio estas pozitiva afero: la noveloj estas pensigaj. Estus interese diskuti ilin kun japano, kiu eble komprenas certajn aferojn pli bone ol mi.

Indas menci, ke la libro estas du-lingva, kun la japana originalo apud la esperanta traduko. Tiel ĝi povas funkcii kiel lernilo, sed por iu, kiu tute ne scias la japanan, preskaŭ duono el la 105 paĝoj ne estas tre utilaj. Mi estas en tiu kategorio, do mi apenaŭ povas prijuĝi la kvaliton de la tradukoj, sed ili legiĝas bone, kaj la esperanta teksto estas provizita per kelkaj utilaj notoj. Kelkaj aferoj

ne estas esprimitaj tiel, kiel mi esprimus ilin, sed multaj aferoj estas ankaŭ tre frappe kaj bele priskribitaj. Mi notis nur unu aferon, kiun mi volus korekti: *pajnhorloĝo al brakhorloĝo*.

Edmund Grimley Evans

Noveloj de Akutagawa Ryūnosuke. El la japana tradukis Konisi Gaku. Eld. JEL, Toyonaka-si, 2010. 105 paĝoj. ISBN 978-4-88887-064-1.



MONATO en Facebook

Kiu anas en la socia retservo *Facebook* ekde nun povas senpage ricevi mallongajn informojn pri MONATO.

Sufiĉas iri al la adreso eo-eo.facebook.com/revuo.Monato kaj alklaki supre la ligilon *Ŝati*.

La mesaĝoj de MONATO ekde tiam aperos en via novaĵlisto.

pp

Ateismo eksterscience



Tre malmultas novaj kaj interesaj verkoj, kritikantaj religiajn dogmojn, dum ĉiam pli kreskas influo de diversaj religioj, eĉ en ĝiaj plej agresemaĵoj. Eŭropanoj kaj usonanoj emas rimarki tion ekstere, en la islamaj landoj – sed tiuj estas, ve, ilia propra spegulo ... Eĉ la vorto „ateismo” fariĝis preskaŭ tabua (konsiderata „ne politike korekta”), kaj ateistoj preferas difini sin per eŭfemismaj nomoj kiel „liberpensuloj”, „agnostikuloj”, „humanistoj” kaj simile. Idealoj de Klerismo, difinintaj la progreson de la homaro dum la lastaj 300 jaroj, iom po iom forgesiĝas, kaj Klerismon anstataŭas nova klerikalismo. Laŭmoda ideologio de „postmodernismo” ĝenerale egaligas ĉiujn mondperceptojn, ĉu religiajn, ĉu sciencajn, ĉu eksterraciajn, neante la eblon rilatigi iujn el ili al la objektiva vero, kio reale nur nutras diversajn superstiĉojn. Esperantling-

va literaturo respegulas la situacion en la naciaj lingvoj, kaj tre malofte eldoniĝas verkoj, kontraŭstarantaj la totalan ofensivon de agresema „spiritualismo”.

Grava evento

Tial apero de *Ateologio* fare de Mikaelo Onfrajo (Michel Onfray), kiun esperantigis kaj eldonis la kooperativa eldonfako de SAT, estas grava evento por la spirita vivo de la esperantlingva komunumo – ja antaŭ ni estas tute moderna verko de la nuntempa franca filozofo. Tial mi kun granda avido eklegis la libron, esperante ekscii el ĝi ion novan, kio helpas al mi ĝisdatigi la propran mondkoncepton kaj ĉerpi iujn novajn argumentojn por ontaj disputoj kun dikredantoj.

Tri taskoj

Tamen, bedaŭrinde, miaj esperoj plenumiĝis nur parte, malgraŭ granda plano konstrui koheran bildon de „ateologio” kun la celo ŝanĝi la religian mondkoncepton je la ateisma, liberiga, bazita sur la bona filozofio. *Ateologio* de Onfrajo devas plenumi la tri sekvajn taskojn: 1) *malkonstrui la tri monoteismojn, kies ĝenerala bazo estas la sama*; 2) *malmunti la kristanismon kaj* 3) *malmunti la teokratiojn*. Sed la nivelo de lia laboro tiurilate ne tute respondas al la modernaj postuloj.

La moderna filozofo-atleisto devus scii, ke la kristanismo kune kun aliaj monoteismaj religioj ne estas la solaj kaj en la historio kaj nuntempe: paganismo (en Hindio, Japanio ktp.) kaj budhismo ja ne neglekteblas. Do, lia universala plano pri malkonstruo de la religio jam suferas je mankoj. Eĉ pli: en sia kritiko

de la kristanismo li, fakte, kritikas ĝin en la romkatolika formo. Tio estas principa eraro – ofte al tiu kritiko volonte aliĝus reprezentantoj de aliaj kristanaj konfesioj (ortodoksa, protestanta ktp). Tiaspeca kritiko povas esti efika por la homoj katolike edukitaj, sed ne por aliaj kristanoj. Kaj, ĝenerale, kritiko de religio nur en ties monoteisma formo povas helpi al kristano aŭ islamano fariĝi ne nepre ateisto, sed, samsukcese, ekzemple, budhisto!

Reale malmunti religion

La kritiko de monoteismoj mem, kvankam ĝi estas tre elokventa kaj talenta, donas nenion novan kompare al ateismaj verkoj de la 18a kaj 19a jarcentoj, kiam ŝajnis, ke sufiĉas montri kontraŭdirojn kaj absurdaĵojn en la „sanktaj” skribaĵoj, kaj la homoj komprenos mal-utilecon de la religio ... Ve, per nura racia analizo religio ne malaperas – ja jam Tertuliano diris, ke oni kredas, ĉar tio estas absurda *credo quia absurdum est*. Do, venki ion principe neracian per nura racia konsidero apenaŭ eblas. Tial racia kritiko de diversaj kredoj estas kvankam necesa, sed nepre ne sufiĉa. La filozofoj ŝatataj de Onfrajo jam bone tion faris, sed religio ne malaperis kaj ne intencas malaperi.

Por reala malmunto de la religio, do, necesas kompreni ties radikojn – subkonsciajn, psikologiajn, sociologiajn. Tion komencis Fejersbaĥo, Markso, Freŭdo kaj aliaj gravaj pensuloj, kaj ĝuste ilia laboro bezonas daŭrigon kaj disvolv. Sed nia filozofo tion ne faras – li simple ripetas post Niĉeo (Nietzsche), ke la dio mortis – sed tio estas nur deziro, sed ne realo. La veran morton de la

dio ni, tamen, ne ĝisvivis.

Religio preteratentata

Kio estas esence grava, li, prave similigante teokratiojn kaj totalismojn (faŝismojn), eĉ trovas la fontojn de ili en la tradiciaj monoteismoj. Li eĉ provas demonstri intimajn ligojn inter naziismo kaj Vatikano (en alia loko, tamen, montrante similajn ligojn inter nazioj kaj islamo). La simileco inter tiuj instruoj certe ekzistas – same kiel simileco inter teokratioj, naziismo kaj stalinismo (pri kiu Onfrajo tute silentas – verŝajne, pro tio, ke stalinistoj proklamis sin „ateistoj”, kio ne malhelpis, interalie, al Stalino mem, post periodo de persekutoj, amikiĝi kun la rus-ortodoksa eklezio), sed ĝi venas ne el deveno de faŝismo aŭ naziismo el kristanismo, sed el tute alia fonto: el tio, ke ĉiuj totalismaj ideologioj de la 20a jarcento estis novaj religiaj formoj, kaj la reĝimoj bazitaj sur ili estis nenio alia ol novaj (sed ne kristanaj!) teokratioj, sendepende de siaj rilatoj kun la tradiciaj religioj. Tio, ke la totalismaj ideologioj (kaj, laŭ mia opinio, ankaŭ

la liberalismo) estas mem formoj de moderna religio, restis de la aŭtoro tute ne rimarkita. Sed li ja ne serĉas kaj ne vidas la radikojn de religia konscio, kaj tial preteratentas religion tie, kie li ĝin ne atendas.

Sed kio estas, laŭ mia opinio, la plej grava manko de la libro, estas plena neglekto far la aŭtoro de la scienco. Konvinka ateismo ne povas ekzisti sen la sukcesoj de la natursciencoj, el kiuj ĝi konstante ĉerpas novajn argumentojn. Kaj teologio, kiu dum lastaj jarcentoj devas iel kunvivi kun la scienco, bone tion komprenas: ĝia granda zorgo estas iel pacigi la malfacile kunigeblajn aferojn! Kaj la tasko de ateisto estas montri, ke tio ne eblas, kaj montri, kiel la moderna scienco malkovras la novajn fenomenojn, kiujn neniu religia penso povis kaj povas antaŭvidi kaj interpreti. Krome, nur la scienco kapablas malkovri la objektivajn radikojn de la religia mondpercepto kaj montri la vojojn por forigi ilin. Vera modelo por tiu vere moderna kaj science bazita ateismo estas, ekzemple, verkoj de Dawkins. Sed Onfrajo estas postmo-

dernisto kaj malfidas al la scienco same kiel al la religio – do, lia ateismo estas, rezulte, kastrita.

Unua gvidilo pri ateismo

Sed mi ne povas konkludi, ke la libro de Onfrajo estas tute senutila. En la situacio de la ĝenerala manko de la ateisma literaturo ĝi iom plenigas la ekzistantan vakuon kaj donas la unuan gvidlinion por la homoj, kiuj komencas foriri de la religio, sed ankoraŭ ne povas formuli mem argumentojn kontraŭ ĝi – almenaŭ por si mem. Ĝi, krome, helpas, kvankam supraĵe, iom orientiĝi en ateisma literaturo, produktita en pasintaj jarcentoj. Do, oni legu la libron kiel unuan gvidilon pri ateismo, precipe se oni devenas el lando kun domino de la romkatolika religio.

Nikolao Gudskov

Michel Onfray (Mikaelo Onfrajo): *Traktaĵo pri ateologio*. Eld. SAT-EFK, loko ne indikita, 2010. 182 paĝoj broŝuritaj. ISBN 978-2-918053-03-3.

Prezo ĉe FEL: 19,76 eŭroj + aŭfranko



Kiel Vaglumo

Willem Elsschot

Antaŭ 50 jaroj mortis Willem Elsschot, unu el la plej famaj flandraj verkistoj de la pasinta jarcento. Okaze de tiu jubileo, Flandra Esperanto-Ligo eldonis la verkon “Kiel Vaglumo” (Het dwaallicht) en traduko de Bert Boon.

“Kiel Vaglumo” estas aspekte maldika libro 56-paĝa, sed enhave ĝi estas novelo plurtavola ... La tavoloj sin kaŝas, ĝis la leganto atingas iun tavoloŝlosilon, kiun li nur per tre atenta legado malkovros.

Eldonjaro: 2010

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 56 paĝoj,

ISBN: 978-90-77066-45-4;

prezo ĉe FEL: 10,00 EUR + aŭfranko.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Duobla laboro

Ĉi foje vi devas solvi du enigmojn kaj fari vorton pere de la sinsekvaj literoj kiujn vi trovas en la samaj lokoj en la kadroj de la du enigmoj. Sendu la solvon antaŭ la 1a de septembro al nia redakcio. Vi povos gajni libropremion.

JPVDD

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

Horizontale:

1. studo de la originoj R
2. esti pli lerte trompa; linan
3. prepozicio; rakontpoezie
4. luma maltago
5. dio de la ventoj; tranĉi malmolan materion R
6. arĝenta monunuo R; nedifinita pronomo; prepozicio
7. familiano (inverse) R; konigi per vortoj
8. tro ŝparema
9. longorela ŝarĝbesto
10. anoj de religiaj ordenoj; elemento kun atomnumero 53 R

Vertikale:

1. muzikaĵo, kiu antaŭas fugon
2. volvu; vasta etendaĵo de sala akvo R
3. Azerbajĝano; malpacienca
4. nokta raba mamulo afrika kaj azia; herbo mediteranea R
5. eŭropano; membro
6. kvanton; irejo R
7. dumfestena propono R; infana
8. ŝmiros; vojo R
9. grupo (inverse) R; tersurface (inverse)
10. senti koleron; sufikso



ROBERT S. DONOVAN

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

Horizontale:

1. efikajn al via bonfarta stato
2. pikanta insekto; verba konjugacio
3. granda R; amfibio (inverse) R; Argentino
4. malofta R; atuta disko R
5. elstaraĵo brusta (inverse); fiksi R
6. infarkto
7. spirgaso; Islando
8. versojn
9. VLPND
10. malviroj; meza parto de la maldika intesto R

Vertikale:

1. movi en ŝakludo; pronomo
2. ovacio; pagilo R
3. amaso da manĝaĵoj R; angla biero
4. 100 l; ŝipanoj
5. potenca spirito; farinta (inverse) R
6. ludkartaj koloroj
7. libera spaco en muro R; lignapece
8. ludkarto atuta R; nazoparto; molekulo (inverse) R
9. favori; numeralo
10. ne pli ol; vizitanton

anoncetoj

Survoje al la UK Kopenhago, de 18-23 julio 2011 la **Hamburga Somero (HoSo)** atendos vin en Germanio. Temo: "Hamburgo - mediprotekta ĉefurbo de Eŭropo 2011". Interrete www.esperanto-hamburg.de/hoso

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO sen-paga elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prele-ga programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knaipo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.interna-cia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzempler. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

La Origino de Specioj

Karolo Darvino



Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.

La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.

Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, La Origino de Specioj restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

Mendu ĉe via loka libroservo
aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
www.retbutiko.net retbutiko@fel.esperanto.be

prezo ĉe FEL: 24 € + afranko (papera versio), 14,40 € (ePub, Mobi aŭ PDF).